
GUSTAVO, RIGARDU!
MI PLUKIS MULTE DA BEROJ!
KIO MISAS, GUSTAVO? KIO OKAZAS?
NE RIGARDU MIN TIEL! VI TIMIGAS MIN!
MI NE ESTAS GUSTAVO, MI ESTAS VIA PATRO!
VI ESTAS MIA FILINO, KAJ JOHANO ESTAS VIA FRATO!
NE! ĈESU!
ĈESU, GUSTAVO! ĈESU!
HO!
ĈIO ESTIS SONĜO. ĈIO OKAZINTA ESTIS NUR MALAGRABLA KOŜMARO.
KIAM MI REVIDOS JOHANON, LI SALUTOS MIN PER AFABLA RIDETO, KIEL KUTIME... JES!


HE HE, SALU-TON!
KORAN DANKON PRO LA RAPIDEGA HELPO...
JEN LA ĈEKO POR LA KVANTO, KIUN VI PETIS.
JES... JOHANO!
KION VI DI-RAS?
STEFA-NINO, NI RICEVIS TION, KION NI PETIS! NI FORIRU!
HE, SE VI PENSIS, KE ĈIO ESTAS RIPARITA... VI ERARIS.
NUN MI PAROLAS PRI VIA KORO.
NE TEMAS PRI MONO, JOHANO.
TIA AMO INTER FRATO KAJ FRATINO ESTAS MAL-BONA AFERO, KIU KON-TRAŬAS LA LEĜON DE DIO!
TIA AMO ESTAS NE-PARDONEBLA DEFLANKIĜO DE LA HOMA VOJO!


JES, LA SOLA EKZISTO DE MIKAELINO SU-FIĈAS POR KE VI ETERNE SUFERO, KAPTITA INTER AMO KAJ SORTO.
KAJ MI JAM SCIAS LA KONKLUDON DE TIO... VI ESTOS DETRUITA!
FOR-IRU!
SE MI VI-DAS VIAJN VIZAĜOJN DENOVE, MI MORTI-GOS VIN!
MIA EKZISTO MEM KAŬZAS AL JOHANO SUFERON!
MIA UNUA ENAMIĜO ESTAS NE-PARDON-EBLA!



LA PRINTEMPAJ PARFUMOJ DISVASTIĜIS EN LA AERO, ILI ESTIS ĈIE FLAREBLAJ.
SED ILIAJ KOROJ ESTIS MALĜOJAJ
ILI TRI APENAŬ BABILIS KUNE EN LA DOMEGO.
LA TAGOJ PASIS GRIZE POR ILI, TRE SILENTE, KAJ ILI NE RIMARKIS...
KE LA PRINTEMPAJ ODOROJ MALAPERIS, LASANTE SPACON AL SOMERO...
JOHANO, RAVELIN.
MI VOLAS PETI ION AL VI.
MI VOLAS VOJAĜI EN HELSINKON.
KIO?!




MI VOLAS VIZITI SINJORON HINDLO, KAJ FARI AL LI MULTAJN DEMANDOJN.
NI IRU, DO!
KONSENTITE!
BRSSS
BRSSS
EN ORDO! LA VENTO FORTE BLOVAS HODIAŬ, ESTU ZORGEMAJ!
VRRRM
LAŬRA, NI IROS AL HELSINKO!
MI BEZONAS KLARIGON!
MI NE TURNU LA KAPON MALANTAŬEN NUN!
NUN MI NE PREFERAS NE FARI DEMANDOJN, SED...
NUR SE MI POVUS VOJAĜI PASINTECEN, KIAM NI NE SCIIS PRI ĈIO ĈI.


LI LOĜAS ĈI TIE.
EN LA TRIA ETAĜO DE ĈI TIU KONSTRUAĴO.
KLAK
FRAP
ENPAŜU! LA PORDO ESTAS MALFERMITA!


HO, SE MI NE ERARAS, VI ESTAS LA JUNAJ SINJOROJ LANTOO.
JES JA, MIA NOMO ESTAS JOHANO J. LANTOO.
JEN MIA PLI JUNA FRATO, RAVELIN. KAJ ŜI ESTAS MIKAELINO.
MI VIDIS LIN ANTAŬE, EN LA VOJO KIU KONDUKAS ONIN AL LA LAGO!
FRATO, TIU INO ĈE LA PENTRAĴO! ŜI ESTAS MIKAELINO!
NE... TIU INO NE ESTAS ŜI.
ĜUSTE, TIU INO NE ESTAS ŜI.
NE MI, SED...
ŜI JA ESTAS TRE SIMILA AL MI.



VI ESTAS TRE SIMILA AL ŜI.
TIU DELIKATEGA HARARO.
TIU RIDETO KUN MELANKOLIAJ OKULOJ RIGARDANTAJ MALSUPREN.
LA NOMO DE TIU POZISTO ESTIS RUDI. RUDI MAKSTER.
RUDI?
TIU PENTRAĴO ESTAS MIA PLEJ ŜATATA VERKO.
ĈU ŜI ESTAS MIA PATRINO?
NU, VERDIRE... NI VENIS ĈI TIEN POR PAROLI PRI LA PATRINO DE MIKAELINO KAJ PRI NIA PROPRA PATRO.
EN ORDO. MI RAKONTOS ĈION, KION MI SCIAS.
MI FAROS IOM DA TEO.
MI EKKONIS RUDI-ON 16 AŬ 17 JAROJN ANTAŬE.
KIAM MI STUDIS ARTON, MI LOĜIS EN MALMULTEKOSTA APARTAMENTARO. RUDI LOĜIS FRONTE AL MI...
NEATENDITE NI AMIKIĜIS, KAJ NI OFTE VIZITIS UNU LA ALIAN.


JES, RUDI NE HAVIS LAŬDINDAN VIVON...
SED ŜI ESTIS BONKORA KIEL ANĜELO.
SED STRANGA JUNULO EKVIZITIS ŜIN SUFIĈE OFTE.
MIA KARA GUSTAVO!
RUDI RUĜIĜIS KIEL INFANETO KIAM ŜI DIRIS LIAN NOMON LAŬTE.
MI BEDAŬRAS DIRI TION ĈI AL LIAJ GEFILOJ, SED LI HAVIS MALFACILEGAN KARAKTERON.
RUDI OFTE VENIS EN MIAN APARTAMENTON POR PLORI.
GUSTAVO NENIAM POVOS MALFERMI SIAN KORON AL MI, VE!
AL LI MALPLAĈAS TIO, KE LI ENAMIĜIS AL MI!
SED MI KOMPRENAS LIN.
LIA ORGOJLO NE PERMESAS AL LI AKCEPTI, KE LI ENAMIĜIS AL IU VIRINAĈO...
SED MALGRAŬ TIO, KE LI SUFERIGAS MIN...
MI VERE, VERE AMAS LIN!


RUDI ĈIAM DIRIS AL MI...
«HINDLO, MI CERTAS, KE MI NASKOS INON! KAJ MI VOLAS, KE ŜIA NOMO ESTU...»
VERŜAJNE LI EKKOLIS, KIAM LI SCIIĜIS, KE RUDI ESTIS GRAVEDA.
MI AMAS LIN, MI AMAS LIN!
MI-KA-ELI-NO!
TAMEN, ŜI VOLIS NASKI TIUN BEBON IEL AJN.
VERŜAJNE ŜI MORTIS DUM LA AKUŜO.
MI ESTIS EKSTERLANDE JE TIU MOMENTO, KAJ MI EKSCIIS PRI ŜIA FORPASO POST MULTE DA TEMPO.
MI AŬDIS NUR TION, KE ŜI JA NASKIS INON, SED LA PATRO FORPRENIS LA BEBON.
MI EKSENTIS TIOM DA NOSTALGIO, KE MI IRIS DEMANDI ĈE LA ARBARISTO.
KAJ KIAM MI VIDIS VIN EN LA NEĜFESTO...



NI BEDAŬRAS, KE LA VIZITO FORPRENIS DE VI TIOM DA TEMPO, NI FORIRU...
KORAN DANKON, SINJORO.
VE! PARDONU, MI NE RIMARKIS, KE MI TRO PAROLIS.
ADIAŬ.
PAŜ
PAŜ
MIA NASKIĜO NE PLAĈIS AL GUSTAVO, DO.
PAĈJO ANKAŬ NE AMIS MIN.
RESUME, LI NENIUN POVIS VERE AMI...


LA HARARON DE MIKAELINO MOVAS LA VENTO...
ŜI ESTAS MIA FRATINO! MIA PLI JUNA FRATINO!
TIU, KIU STARAS ANTAŬ MI... ŜI ESTAS MIA FRATINO!


MI NE PLU RAJTAS TUŜI ŜIN.
NE ESTAS PERMESATE, KE NIAJ DU KOROJ ES-TU KUNE...


SINJORETO RAVELIN, KIE ESTAS SINJORETO JOHANO?
MI NE SCIAS. EBLE LI PROMENAS ĈE LA LAGO.
LA FESTO DE LA SOMERA SOLSTICO OKAZOS BALDAŬ.
LA PLEJ MIRINDA MOMENTO EL LA JARO!
KVIVIT
KVIVIT
LA SONO VENAS DE TIU FLANKO!
NAJTINGALO!


BRSS
ESTIS VI, DO!
MI EK-KANTIS SUBITE.
NI ĈIUJ KREDIS, KE MI FORGESIS TIUN KANT-STILON ANTAŬ MULTE...


ĈU VI PERMESAS, KE MI SIDIĜU APUD VI?
JES JA.
MI DEVAS DIRI ION...
ION AJN!
KIAM MI UNUAFOJE AŬDIS VIAN KANTADON... MI KREDIS, KE VI ESTIS NAJTINGALO.
NAJTINGALO?
NAJTINGALO ESTAS BIRDO, KIES KANTO SONAS BELE.
ĜI KANTAS AŬDEBLE, SED ONI MALOFTE VIDAS ĜIN. TIAL ONI KROMNOMAS ĜIN «LA FANTOMA BIRDO» AŬ «LA BIRDO SEN HEJMO».
NAJTINGALO...
BIRDO, KIU NE VIDEBLAS.
BIRDO, KIU NUR KANTAS SENĈESE...


MI-KAE-LI-NO!
MIKAE-LINO, MIKAE-LINO!
KIO OKAZAS, JOHANO? KIAL VI MOVIĜIS SUBITE?
DUM UNU MOMENTO, ŜAJNIS AL MI, KE VI FANDIĜIS KUN LA ĈIELO KAJ LA ARBE-TAĴOJ!
KVAZAŬ VI ESTUS MAL-APERANTA!


MI NE KAPABLAS FORGESI VIN!
NI LOĜU SOLAJ, EN FORA LOKO KIE NENIU REKONOS NIN!
NI FUĜU EL ĈI TIU BIENO!



MI BEZONAS NUR VIN, MIKAELINO! NENIO ALIA NECESAS!
DAN-KON...
JOHA-NO, DAN-KON.
JOHANO, BONVOLU KISI MIN.
MI-KAE-LINO!
BONVOLU KISI AL VIA FRATINO...
LA DEKS-TRAN VAN-GON.


BON-VOLU.
VŜŜ
LA ĈIELO ESTAS TIEL VASTA KAJ BELEGA...
KIAM MI ETENDAS LA BRAKOJN, MI SENTAS KE MI FLUGAS EN LA ĈIELO.



JES, MI VOLAS TRANSFORMI MIN EN BIRDON, EN NAJTINGA-LON...
SE MI FARI-ĜUS BIRDO, MI POVUS ESTI ĈIAM APUD LI.
MIAJ VORTOJ KAŬZAS NUR SU-FERON AL JOHANO.
MI NE BEZONAS LA VOĈON POR PARO-LI. MI VOLAS NUR KANTI.
KANTANTE MI POVUS KRII TIOM LAŬTE, KIOM EBLAS...
MI VOLAS ELLASI MIAJN SENTOJN.
VE, JO-HANO...
JOHANO!




ĈU NUR VI DU ĈE LA TABLO?
MIKAELINO MANĜOS EN SIA DORMOĈAMBRO, ĈU NE?
LAŬRA, RAVELIN. ĈU VI VIDIS MIKAELINON POST LA TAGMEZO?
NE...
NE, FRATO.
MI NENIAM REVIDIS ŜIN POST TIU FOJO...
KLANK
VŜS
RAVELIN, NI TUJ TROVU MIKAELINON!
SED, FRATO...
KIO MISAS?


MI NE SCIAS...
MI SUBITE MALTRANKVILIĜIS. NI SERĈU ŜIN!
ŜI NE ESTAS ENE DE LA DOMEGO.
MIKAELINO!
MIKAELINO!
ŜI NE ESTAS ĈI TIE, FRATO.
JEN ŜIA...
JEN ŜIA HARFIKSILO!
EBLE ŜI IRIS AL LA BLANKFLAMA LAGO!
VŜŜ


MIKAE-
LINO...
MI-
KA-
ELI-
NO!
FRA-
TO!!
TIO ESTAS
NUR BOATO
SUR LA LAGO.


NUR TIO...
NUR TIO...
NAJTIN-GALOJ!
KIAL TIOM DA KRIADO? ŜAJNAS, KE ILI FRENE-ZIĜIS!
KVIVIT KVIVIT


ŜIA KANTADO RESONIS EN LA ARBARO KAJ EN LA MALVARMA, KRISTALA LAGO. LA NOKTOMEZA SUNO ESTIS PROKSIMA, SAME KIEL LA SOMERO...
NENIU REAŬDIS ŜIAN VOĈON, TAMEN ŜIA KANTADO ETERNIĜIS.


NAJTINGALO ESTAS BIRDO, KIES SOLA OKUPO ESTAS KANTADI.
KAJ ĜIA BLEKO SIMILAS AL LA KANTADO DE JUNA VIRINO.
★★おわり★★